圓大圓
(Won Daewon)

# VOJOJ AL LA PINTO DE LA FUĴI-MONTO




## Kiu religio estas la vera kaj kia estas Dio, se estas Dio?

**ESPERANTLINGVE ĈIRKAŬ LA MONDO**

„*Just as a candle cannot burn without fire, men cannot live without a spiritual life*” (*Same kiel kandelo ne povas bruli sen fajro, homoj ne povas vivi sen spirita vivo.*)

Gautama Buddha

圓大圓

**(Won Daewon)**

# VOJOJ AL LA PINTO DE LA FUĴI-MONTO

圓大圓
(Won Daewon)

VOJOJ AL LA PINTO DE LA FUĴI-MONTO

ISBN 978-963-571-506-0

Ĉiuj rajtoj rezervitaj!

© Dr. Márkus Gábor, 2024

Lingve kaj enhave kontrolita de 최대석 (Ŝtonego)

Eldonis:

HEA 1902
MAGYARORSZÁGI ESZPERANTÓ SZÖVETSÉG
HUNGARIA ESPERANTO-ASOCIO
1146 Budapest, Thököly út 58-60. 1368 Budapest, Pf.: 193.

Presis: Vareg Hungary Kft., Budapest

# ANTAŬPAROLO

D-ro MÁRKUS Gábor, la aŭtoro de ĉi tiu eseo diplomiĝis en la Budapeŝta Ekonomika Universitato en 1972 kaj poste instruis matematikon en la sama universitato. En 1982 li ricevis stipendion por studi en japana katolika 南山大学 (Nanzan Universitato) por doktoriĝi pri la japana ekonomia evoluo. Poste li fariĝis strategia manaĝero de la Hungara Petrola kaj Gasa Korporacio, la plej granda industria entrepreno dum tiu tempo en sia lando. Grandaj posedantoj de tiu korporacio estis usonaj financaj fondusoj, kaj pro tio oni sendis lin studi manaĝerajn metodojn en Boston, Massachusetts, Usono. Je la fina parto de sia profesia kariero li laboris por la Hungara Parlamentejo kaj lia tasko estis kontroli la registaron.

Li esperantistiĝis en 1981 kaj poste elektiĝis Komitatano por Hungario en la plej alta decidopova organo de Universala Esperanto-Asocio kaj honora prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio. Li fondis la Eŭrazian Kulturan Centron por evoluigi la kulturajn rilatojn inter Eŭropo kaj Azio, kaj instruis eŭropajn lingvojn en la Srinakharitwirot Universitato en Bangkok, en la Reĝo Mongkut Universitato de Teknologio en Thonburi, Tajlando, kaj kiel gastpreleganto kontribuis al la kursoj de Lee Jungkee, prezidanto de Seula Esperanto-Kulturcentro en diversaj koreaj universitatoj. Li regule prelegis pri diversaj mondhistoriaj kaj soci-

osciencaj temoj en la Virina Supermezlernejo Munil (문일 여자 고등학교) en angla lingvo, kaj li enkondukis la instruadon de Esperanto en la 인드라망 대학 (Indramang Universitato), fondita de la 1200-jaraĝa budhisma 실상사 (Silsang templo) en la 지리산 (Ĝirisan) montaro.

La aŭtoro vivis en komunisma politika sistemo dum kvardek jaroj, kiam ateismo estis la oficiala ŝtata ideologio kaj (same kiel ĉiuj studentoj dum tiu tempo) ankaŭ li devis studi kaj ekzameniĝi en ateismo kaj scienca materiismo. Li (same kiel la plejmulto de la hungara loĝantaro dum tiu tempo) apartenis al kristanismo kaj poste li studis en katolika universitato. Dum liaj vojaĝoj tra la mondo li povis konatiĝi ankaŭ kun la islama, budhana kaj ŝintoa religioj.

Li ĉiam estis scivolema kaj malfermita por konatiĝi kun diversaj mondkonceptoj kaj pensmanieroj, kaj li ĉiam respektis ĉiujn homojn sendepende de iliaj mondkonceptoj aŭ religiaj kredoj kaj liaj partneroj ĉiam aprezis tion. Kiam la islama komunumo vidis lian respektoplenan konduton en la Bandunga Granda-moskejo, grava religia centro en Indonezio en la plej granda islama lando en la mondo, nekonataj homoj salutis lin amikece per manpremoj.

Dum lia studenta vivo en Japanio li ricevis fortan financan kaj moralan subtenon de katolika monaĥa ordeno nomata „*Societo*

*de Dia Vorto*” (*Societas Verbi Divini* en latina lingvo). Nun kiel maljunulo, li subtenas finance la bonfaran agadon de la sama ordeno en la Sankta Karlo Universitato en la Filipinoj, kie Lányi Béla, hungara katolika monaĥo subtenas orfojn. En 2022 d-ro Márkus Gábor elektiĝis membro de Revizora Komisiono de Internacia Katolika Esperanto-Unuiĝo, tiel li subtenas ankaŭ la katolikan esperantistan mondmovadon.

En 1982 Oomoto, moderna japana ŝintoa religio organizis la Japanan Esperanto-Kongreson kaj kiel malriĉan orient-eŭropan studenton ili invitis la aŭtoron senpage ĉeesti la eventon en urbo Kameoka. Tie Márkus Gábor konatiĝis kun la slogano de la organizaĵo „*Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo*”, kun kiu li konsentis. Ekde tiam li kunlaboras kun tiu organizaĵo, prelegas kaj instruas en iliaj eventoj, eĉ membriĝis en la Universala Homama Asocio de Oomoto.

Antaŭ pli ol dek jaroj la „*Esperantista Asocio de Ŭonbulismo* ” (koree 원불교, angle: Won buddhism) en urbo Iksan organizis „*Internacian Esperanto-Renkontiĝon de Meditado*”, kie ankaŭ Márkus Gábor ĉeestis. Tie li ĝuis nekutime bonan etoson, interesajn prelegojn, amikajn rilatojn inter la membroj de la ŭonbulisma komunumo, solidarecon por helpi aliulojn kaj profundajn kaj saĝajn pensojn en la doktrino de la religio. Ekde tiam li ĉeestis tiujn renkontiĝojn dum ĉiuj jaroj (krom la kronvirusa pandemio) kaj en 2023 li akceptis kun ĝojo kaj honoro ke la organizo ak-

ceptis lin kiel membro kaj la Ĉefa Darma Majstro donis al li la ŭonbulanan nomon 圓大圓 (prononce: Ŭon Deŭon).

Dum sia profesia kariero d-ro Márkus Gábor vizitis multegajn landojn en ĉiuj kvin kontinentoj kaj konatiĝis kun diversaj ideologiaj, religiaj kaj kulturaj tradicioj en la mondo. Nun li trarigardas siajn spertojn en ĉi tiu eseo kaj laŭ siaj spertoj li provas konkludi, kiu religio povas esti la vera religio kaj kia povas esti Dio, se estas Dio.

Dum la lastaj jardekoj D-ro Márkus Gábor regule ĉeestis la renkontiĝojn de nia Budapeŝta Medicinista Esperanto-Fakgrupo (mallonge: BMEF) kaj regule prelegis pri tiuj temoj. Ni ĝojas, ke nun li ankaŭ en ĉi tiu eseo resumas siajn konkludojn. Ĉi tie li ne sciencnivele analizas la diversajn mondkonceptojn el filozofiaj vidpunktoj, sed li trarigardas siajn personajn spertojn, kiujn li ricevis dum siaj mondvojaĝoj en multaj landoj de la kvin kontinentoj.

Budapeŝto, la 3-an de Decembro 2023.

D-rino FARKAS Julianna

BMEF sekretario

# MONDA STATISTIKO PRI RELIGIOJ KAJ ALIAJ MONDKONCEPTOJ

La Pew Esplora Centro (pli precize la Pew Research Center's Forum on Religion & Public Life) faris enketon en 2010 en 230 landoj por studi kiom da homoj apartenis al diversaj religiaj grupoj dum tiu tempo[1]. Tiam la nombro de la monda loĝantaro estis 6.9 miliardoj da homoj kaj laŭ la rezulto de tiu esploro en tiu jaro estis

- 2.2 miliardoj da kristanoj (32% de la monda loĝantaro),
- 1.6 miliardo da islamanoj (23%),
- 1 miliardoj da hinduoj (15%),
- 500 milionoj da budhanoj(7%),
- 14 milionoj da judoj (0.2%)
- 458 milionoj (7%) apartenis al diversaj aliaj (afrikaj, amerikaj indianaj, aŭstraliaj praloĝantaraj, ŝintoaj, taoismaj, ktp.) tradiciaj religioj.

Krome 1.1 miliardoj da homoj, do 16% de la monda loĝantaro anoncis, ke ili apartenis al neniu religio, tamen multaj

1 https://www.pewresearch.org/religion/2012/12/18/global-religious-landscape-exec/

el ili havis diversajn religiajn kredojn, ekzemple kredon je Dio, aŭ kredon je universala spirito.)

Laŭ historiaj spertoj estis religioj, kies membroj kredis, ke nur ilia unusola religio estis vera, kaj oni serioze malpermesis al siaj membroj forlasi sian religion aŭ aparteni al aliaj religioj. Pro tio estiĝis multaj kruelaj militoj pro religiaj malsamecoj dum la homa historio kaj pro tio cent milionoj da homoj mortis. Laŭ vikipedio nur dum la Tridekjara Milito en Eŭropo mortis pli ol 5 milionoj da homoj kaj estis germanaj regionoj, kie pli ol duono de la loĝantaro perdiĝis[2].

En aliaj religioj estis natura afero, ke la membroj povas aparteni ankaŭ al aliaj religioj. Ekzemple kiam mi estis en Japanio, tiam mi spertis, ke milionoj da japanoj havis postnaskiĝan kaj geedziĝan ceremonion en ŝintoaj sanktejoj kaj funebran ceremonion en budhismaj temploj. Kelkaj el ili kredis eĉ je taoismo.

Vidante ke abundis religioj dum la homa historio kaj ke homoj kredis en diversaj dioj kaj spiritaj potencoj en malsamaj religioj, indas esplori: kiu religio povas esti la vera religio, kaj kia povas esti Dio, se estas Dio.

---

2 https://en.wikipedia.org/wiki/Thirty_Years%27_War

# KIA ESTAS ELEFANTO?

Laŭ malnova barata (india) rakonto grupo da blinduloj aŭdis, ke stranga besto, nomata elefanto, estis alportita al la urbo, sed neniu el ili konsciis ĝian formon. Pro scivolemo, ili diris: "*Ni devas inspekti kaj scii ĝin per tuŝo, pri kio ni kapablas*".

Do, ili serĉis ĝin, kaj kiam ili trovis ĝin, ili palpadis pri ĝin. La unua persono, kies mano alteriĝis sur la trunkon (nazan organon de elefanto), diris: "*Ĉi tiu estaĵo estas kiel dika serpento*". Por alia, kies mano atingis ĝian orelon, ĝi ŝajnis kvazaŭ ventumilo. Alia homo, kies mano estis sur sia kruro, diris: "*La elefanto estas kolono kiel arbotrunko.*"

La blindulo, kiu metis sian manon sur ĝian flankon, diris, ke la elefanto "*estas muro*". Alia, kiu palpis ĝian voston, priskribis ĝin kiel ŝnuron. La lasta palpis ĝian dentegon, deklarante ke la elefanto estas tio, kio estas malmola, glata kaj kiel lanco.



# KIA ESTAS DIO?

Dum la homara historio diversaj homoj havis tute malsamajn konceptojn pri Dio aŭ pri dioj, eĉ vivantaj dioj abundis en la mondhistorio. En la antikva Romia Imperio la imperiestro estis rigardata kiel dio, kaj se iuj ne emis kredi tion, tiam tiuj homoj estis serioze punitaj. Pro tio estiĝis kristanaj martiroj dum la unuaj du jarcentoj, ĉar ili ne emis rigardi la imperiestron kiel dion. Ili ne kredis, ke ordinara homo povus esti dio, sed laŭ ilia koncepto Dio estis spirita Plenpotenculo, Eternulo, kiu kreis la mondon.

Ankaŭ dum la vivo de mia generacio estis homoj, kiuj ricevis similajn respektojn, kiajn dioj kutimis ricevi en la antikva Romia Imperio. Post la Dua Mondmilito oni decidis, ke Orienta Eŭropo estu sub kontrolo de Sovet-Unio, kies estro estis Stalin. Dum tiu tempo okazis, ke homoj diris la vorton „Stalin" anstataŭ Dio en tradiciaj religiaj kantoj. Tiam oni kantis kutime (en la hungara lingvo) „*Munkára készen Isten nevében*…" kio signifis „*Ni pretas komenci labori en la nomo de Dio*…". Sed anstataŭ tio dum tiu tempo on kantis jene „*Munkára készen Sztálin nevében*" kio signifas „*Ni pretas komenci labori en la nomo de Stalin*".

En la okdekaj jaroj de la lasta jarcentro mi vizitis sudĉinan urbon, kie estis granda statuo de Mao Zedong en la urbocentro. Tiam lokanoj rakontis al mi, ke dum la tempo de Mao Zedong

estis kutimo, ke ĉinoj havis matenan preĝon antaŭ tiu statuo kaj promesis diligente labori dum la onta tago. En la okcidenta mondo homoj kutimis fari tion antaŭ statuo de Jesuo-Kristo.

Ankaŭ la japanaj imperiestroj estis en unika situacio rilate al tiu temo, ĉar ekzemple imperistro Shōwa estis persista en la ideo, ke la imperiestro de Japanio devus esti konsiderata posteulo de la dioj[3]. Tamen post la Dua Mondmilito la imperiestro la 1-an de januaro 1946 oficiale deklaris, ke li ne devas esti rigardata kiel vivanta dio.

En la Okcidenta mondo Dio estas rigardata kiel la Supera Estaĵo, metafizike la fina bazo kaj kaŭzo de ĉia ekzistado. Li nomiĝas la Eternulo en la juda Malnova Testamento, kaj en la kristana Nova Testamento li estas rigardata kiel la esenco de la tri diaj personoj, la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito.

En tiu senco parolas Charles Darwin pri Dio (uzante la nomon „Eternulo”) en la lasta frazo de sia libro titolita „*La origino de specioj*”. Ankaŭ Isaac Newton kredis je Dio en tiu senco kaj li vidis Dion kiel la majstran Kreinton, kies ekzisto ne povus esti neita antaŭ la grandiozeco de la tuta kreado. La Dio, je kiu li kredis, estis Dio, kiu ne nur kreis la mondon, sed restis en regado super la mondo, kaj havis "inklinon al ago" ene de la mondo.

3 https://en.wikipedia.org/wiki/Emperor_of_Japan

Sankta Johano, unu el la unuaj disĉiploj de Jesuo, skribis, ke „*Neniu neniam povis vidi Dion*” (Johano 1,18), ĉar Dio kiel la Supera Estaĵo estas pli ampleksa ol homa racio povas imagi. En la juda kaj en la islama kaj ankaŭ en la frua kristana religioj la desegnado kaj pentrado de Dio estis melpermesata, sed poste estiĝis kutimo en la katolikaj temploj pentri diversajn Dio-simbolojn (ekzemple blankharan maljunan homon, aŭ ĉion vidantan okulon, ktp.) sur la muron de la preĝejoj.



La templo en Törökszentmiklós, kie la Aŭtoro ekkonatiĝis kun la mondo dum sia juneco

# KIU ESTAS DIO?

Dum la komunisma epoko materiismo kaj ateismo estis la oficiala ŝtata mondkoncepto en Hungario, kaj tiam ofte okazis, ke oni maldungis homojn, se ili vizitis religiajn ceremoniojn. Estis deklarite, ke universitatoj ne rajtis akcepti religiemajn studentojn en kelkaj fakultatoj, ekzemple en juraj fakultatoj kaj ankaŭ en fakultatoj. kie oni instruis ontajn instruistojn. Tiam la universitata enirekzameno kaŭzis gravajn problemojn al tiuj studentoj. Se ili malkovris, ke ili kredis je Dio, tiam la universitato rifuzis ilian akcepton. Sed se ili mensogis kaj diris ke ili ne kredis en Dio, tiam ili sentis ke ili faris krimon laŭ la religiaj leĝoj.

En tiu tempo okazis, ke Tomka Miklós, mia amiko, tre religiema junulo iris al sia universitata enirekzameno. Kaj la unua demando estis

- Ĉu vi kredas je Dio?

Tiam Miklós pensadis, kiel li respondu, por ke li ne mensogu kaj tamen li ne estu tuj rifuzita. Do li redemandis:

- Parolu pri precize pri kiu temas! Kiu estas Dio?

Tiam la ekzamenisto volis helpi tiun junan studenton kaj precizigis la demandon jene:

- Vi bone scias, Tamás, pri kio temas. Temas pri la blankhara maljuna homo, kies vizaĝo estas pentrita sur la muro de la templo.

Aŭdante tiun demandon Tamás trankviliĝis kaj respondis jene:

- Sinjoro profesoro, je tio mi tute ne kredas.

Tio estis saĝa respondo, ĉar Tamás certe ne kredis, ke Dio estis maljuna blankhara homo, sed laŭ lia koncepto Dio estis pli ampleksa Supera Estaĵo, Eternulo, ĉiopovulo, kiu kreis la universon kaj ĉion estaĵon en ĝi. Sekve de tio, lia konkreta formo tute ne estas imagebla por homa racio. Tiel la universitato akceptis lin, kaj li sukcese finis sian universitatan programon kaj post la politikaj ŝanĝoj en Orienta Eŭropo li fariĝis profesoro de sociologio en la denove refondita Katolika Universitato en Budapeŝto.



La Aŭtoro prelegas en Koreio

# KIU KREIS SIMIOJN, SE NE ESTAS DIO?

Dum mia juneco mi vivis en komunisma politika sistemo, kie la oficiala ŝtata ideologio estis ateismo kaj materiismo kaj la registaro kaj la ŝtataj gvidantoj emis malhelpi la agadon de religiaj komunumoj. Tiam la estroj de la komunisma partio havis la taskon fari propagandon por ateismo kaj paroli publike en tiu senco. Tiam estis kutimo inviti ateismajn prelegantojn al vilaĝoj por konvinki la vilaĝanojn, ke Dio ne estas. Kaj la lokaj komunismaj partigvidantoj devis subteni tiujn prelegantojn kaj publike deklari, ke ankaŭ ili ne kreis je Dio.

Onidire okazis ie, ke vilaĝa komunisma partigvidanto invitis prelegiston paroli, ke malgraŭ la religiaj doktrinoj ne Dio kreis homojn, ĉar Dio ne estis kaj Dio ne estas. Sed laŭ la teorio de Charles Darwin homo devenas de simioj. Aŭdante tion la vilaĝanoj maltrankviliĝis kaj kriadis, ke ili estis homoj kaj ne bestoj. Kaj ili diris, ke la prelegisto parolis stultaĵojn. Vidante tiun malagrablan situacion la partigvidanto (sekretario de la loka komunisma partiorganizaĵo) provis trankviligi la vilaĝanojn jene:

- *Trankviliĝu virinoj! Tiu teorio ne estas ŝoka, ĉar ni bone scias, ke ankaŭ la simiojn Dio kreis.*

# DE ANIMALA EKZISTO ĜIS DIIĜO

Mondhistoriistoj opinias, ke la unuaj homoj nomataj „*homo sapiens*” en latina lingvo („*saĝa homo”* en Esperanto) aperis en Centra Afriko antaŭ 200 mil jaroj. Multaj sciencistoj, ekzemple Yuval Noah Harari, profesoro en la Hebrea Universitato en urbo Jerusalemo skribas, ke la unuaj homoj tiam estis similaj al bestoj kaj ne estis pli signifaj ol insektoj, meduzoj aŭ simioj. Tamen ili rapide evoluis kaj nun ili jam estas pli ol sep miliardoj kaj okupis ĉiun teron sur la Terglobo. Dum tiu tempo, ĉefe dum la lastaj du aŭ tri miljaroj ili havis terurajn militojn kaj mortigis cent milionojn da homoj.

Krome ili detruis la naturon (ĉefe dum la lastaj cent aŭ ducent jaroj), pereigis la praarbarojn, kreis ozonan truon, pro kio oni jam ne plu estas protektata kontraŭ danĝeraj sunradioj, kaj malpurigis la riverojn, lagojn, marojn kaj oceanojn. Profesoro Harari asertas, ke „… *dum jarmiloj homoj fariĝis majstroj de la tuta Terglobo kaj teroristoj de la ekosistemo (natura medio). Hodiaŭ ili komencas estiĝi dioj, kiuj klopodas akiri eternan junecon kaj posedi la potencon de kreo kaj detruo...”*[4]

Dum la homa historio kruelaj militoj sekvis unu post la alia. Interalie romiaj imperiestroj kreis la antikvan Romian Imperion en multaj landoj de la nuna Eŭropo. Ĝingis ĥano okupis grandegan

4 Harari: SAPIENS- A brief history of humankind, pagxo 465

teritorion en Azio kaj pereigis multajn popolojn, interalie li detruis la tiaman Grandan Hungarion. Britio, Hispanio kaj Portugalio okupis kaj koloniigis Amerikon, parton de Afriko kaj Sud-Azio kaj Aŭstralion.

Kelkaj homoj opinias, ke tio estis bona, ĉar pro tiuj historiaj eventoj estiĝis pli evoluintaj landoj kaj urboj, ekzemple eŭropaj koloniistoj konstruis la modernajn ĉielskrapantojn en la amerikaj grandurboj kaj ili (do ne la indiana praloĝantaro) konstruis Usonon la plej forta ekonomia financa kaj milita potenco de la mondo. „*Immigrants made America great*" (Enmigrantoj faris Amerikon granda) – diras la usona slogano. Estas fakto, ke multaj homoj opinias tiel, sed estas ankaŭ aliuloj, kiuj opinias, ke la prezo de tiu ekonomia evoluo estis tro alta, pro tio okazis la pereo de la origina loĝantaro en multaj partoj de la Terglobo.

La kialoj de tiuj bataladoj kaj militoj ofte estis religiaj kaj ideologiaj. Estas malfacile kompreni, tamen okazis, ke iam la kaŭzo de batalado kaj malamikeco inter diversaj kristanaj grupoj estis nur unu litero. Grupo de kristanoj asertis ke Jesuo kaj Dio estis esence la sama, tio estis koncepto de „*homousion*" en latina lingvo. Aliuloj asertis, ke Jesuo kaj Dio estis similaj, tio estis koncepto de „*homoiusion*" en latina lingvo. En la dekunua jarcento okazis, ke estiĝis malamikaj rilatoj inter katolikoj kaj ortodoksoj, kaj en la deksesa jarcento estis militoj inter katolikoj kaj protestantoj. Malgraŭ la fakto, ke ĉiuj tiuj grupoj estis kristanoj,

kiuj bone sciis, ke laŭ Jesuo la plej grava leĝo estis la leĝo de amo, kio signifas, ke homo devas ami aliulojn, same kiel ili sopiras esti amata de aliaj homoj.

Inter la dekunua kaj la dektria jarcentoj estis krucmilitoj inter kristanoj kaj islamanoj, kaj dum la dekkvina, deksesa kaj deksepa jarcentoj estis longedaŭraj militoj inter la islama Turka Imperio kaj multaj landoj de Orienta Eŭropo, kiam ankaŭ triono de la Hungara Reĝlando estis okupita. Dum la dudeka jarcentro estiĝis du mondmilitoj. Pro la Unua Mondmilito estiĝis 40 milionoj da viktimoj, 20 milionoj mortis kaj 20 milionoj vundiĝis. Pro la Dua Mondmilito mortis 7-85 milionoj da homoj[5], kaj inter ili 6 milionoj da judoj estis mortigitaj per la nazia Germanio[6]. Dum la sama jarcento estiĝis komunismaj landoj, kie ateismo estis la oficiala ŝtata ideologio kaj ankaŭ tiam okazis kruelaj bataladoj inter diversaj homaj grupoj. Laŭ „*La Nigra libro de Komunismo*”[7] la nombro de viktimoj de komunismo estis pli ol 96 milionoj.

Vidante tiun fenomenon, indas analizi, kial homoj kaj nur homoj (do ne bestoj) povis tiel kruele mortigi unu la alian. Mi aŭdis interesan teorion rilate al tiu temo en Sud-Ameriko en la Internacia Kongresa Umiversitato dum la Argentina Universala Kong-

5 https://en.wikipedia.org/wiki/World_War_II_casualties
6 https://encyclopedia.ushmm.org/content/en/article/documenting-numbers-of-victims-of-the-holocaust-and-nazi-persecution
7 https://en.wikipedia.org/wiki/The_Black_Book_of_Communism

reso de Esperanto. Tie ni trarigardis, kiel la Sud-Amerikaj indianoj pereis kaj kial nur malpli ol 3% de la Argentina loĝantaro apartenas al diversaj indianaj triboj dum nia epoko.

Dum la Kongresa Universitato ni diskutis teorion de Christian de Duve, medicina Nobel-premiita biokemisto, kiu skribis sian koncepton en sia libro, kies titolo estas: *”Genetics of Original Sin: The Impact of Natural Selection on the Future of Humanity*” (*Genetiko de origina peko: La Efiko de Natura Selektado sur la Estontecon de la Homaro*). En tiu koncepto profesoro de Duve pretendas, ke homaro povis akiri regantan rolon sur la Terglobo per procedo de natura selektado. La agresemo, egoismo, sopiro por potenco kaj similaj homaj trajtoj genetike koditaj en homa naturo kaŭzis, ke homoj bataladis unu kontraŭ la alia dum la tuta homa historio. Krome la senprecedenta homa cerba potenco kaj la granda adaptiĝemo ebligis, ke homaj socioj sukcese okupis ĉiujn teritoriojn de ĉiuj kvin kontinentoj. Nun en la dudekunua jarcentro la situacio estiĝis kriza, ĉar la homaro amasigis tiom multe da amasdetruaj armiloj (nukleaj bomboj, ktp), ke per ili oni povas tute detrui la vivkondiĉojn sur la Terglobo.

# LA RELIGIO DE AMO

Malgraŭ la fakto, ke la tuta homara historio estas historio de preskaŭ permanentaj militoj kaj bataladoj, tamen preskaŭ ĉiam estis religiaj komunumoj, kie la membroj sindoneme agadis por helpi aliulojn kaj agadis por pacigi kaj plibonigi la mondon. La morala ordono esti kompatema, pardondonema, amikema kaj amema estas instruo de multaj religioj. En kristanismo, la plej multnombra religia komunumo de la mondo la venontaj „*Dek Ordonoj*" resumas la moralajn instruojn, kiujn kristanoj devas obei.

I. Adoru vian Sinjoron, vian Dion, kaj servu nur al Li!

II. Ne prenu la nomon de Dio vane!

III. Konservu la tagon de la Sinjoro sankta!

IV. Honoru viajn patron kaj patrinon!

V. Ne mortigu!

VI. Ne faru adulton!

VII. Ne ŝtelu!

VIlI. Ne mensogu kaj ne difektu la honoron de aliaj!

IX. Ne deziru la edzinon de via najbaro!

X. Ne deziru aliulajn havaĵojn!

Kristanismo devenas de judaismo, ĉar Jesuo, la Kreinto de kristanismo kune kun siaj ĉiuj unuaj disĉiploj estis judoj kaj ili estis edukitaj laŭ judaj tradicioj. En la juda religio estis multaj moralaj ordonoj kaj judoj ofte diskutis, kiu ordono povas esti la ĉefa. Pro tio "*... unu el la oficistoj demandis Jesuon: Majstro, kiu estas la plej granda ordono en la Leĝo? Jesuo diris al li: Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro, per via tuta animo, per via tuta menso kaj per via tuta forto! Kaj amu vian proksimulon kiel vin mem!*"[8] En sia adiaŭa parolado antaŭ sia morto Jesuo donis al ni "*novan ordonon*" jene: "*Amu unu la alian same kiel mi amis vin!*"[9] Tio estas do la ĉefordono en kristanismo, tamen la multaj bataladoj kaj militoj inter diversaj kristanaj komunumoj dum la lastaj du jarmiloj montras, ke homoj ankoraŭ ne plene komprenis la mesaĝon de tiu ordono.

Tiu parto de Hungario, kie mi pasigis junecon, apartenis al la katolika mondo, do estis nature, ke ankaŭ mi estiĝis membro de tiu komunumo. Poste mi studis ekonomikon en japana katolika universitato nomata 南山大学, kie mi trovis tre bonan etoson, la universitato eĉ finance subtenis min. Tiam mi estis juna orienteŭropa studento, sed nun mi jam maljuniĝis kaj pensiuliĝis. Pro tio mi pensas, ke jam alvenis la tempo kiam mi devas subteni la nunajn junulojn, kiuj bezonas subtenon. Pro tio

8 La Evangelio de Sankta Marko 12,30-31

9 La Evangelio de Sankta Johano 13:34

mi aliĝis al la grupo de Lányi Béla, hungara misiisto en la Sankta Karlo Katolika Universitato en urbo Cebu, en la Filipinoj. Tiu homo apartenas al la sama katolika monaĥa ordeno, kiu posedas mian japanan universitaton kaj krom sia universitata laboro li kolektas orfojn vivantajn sur stratoj, kaj instruas, vestas kaj manĝigas ilin. Mi pensas, ke tia bonkora kaj sindonema agado estas nepre subteninda.

Krome, mi partoprenas ankaŭ en la internacia kristana esperantista movado, estis granda honoro por mi, ke antaŭ tri jaroj IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) elektis min membro de sia Revizora Komisiono.



La Kupolo de la Roko en Jerusalemo estas sankta loko por tri mondreligioj (judoj, islamanoj kaj kristanoj)

# OOMOTO KAJ LA KYOTO-MONAĤEJO

Dum la lastaj jarcentoj aŭ jarmiloj la religia kaj ideologia netoleremo regis la Okcidentan mondon. Multaj religioj kaj ideologioj, interalie judaismo, kristanismo, islamo, eĉ ateismo kaj materiismo pretendis, ke sole ilia kredo estis vera kaj oni serioze punis homojn, kiuj ne emis kredi tion. Milionoj da viktimoj estiĝis pro tia religia kaj ideologia maltorelemo.

Dum la komunisma epoko ordinaraj homoj kutime ne ricevis pasporton por viziti kapitalismajn landojn. Sed en la komenco de la okdekaj jaroj la hungara registaro permesis al hungaraj civitanoj viziti familianojn kaj geamikojn en kapitalismaj landoj, se ili estis invititaj, do se ili ne bezonis aĉeti kapitalisman monon de la oficialaj hungaraj bankoj. Tiam mi legis anoncon en la Budapeŝta Informilo, ke la Kyoto Syudoin (budhana monaĥejo en Kyoto) invitis esperantistojn, kiuj interesiĝis pri budhismo kaj Orienta kulturo.

Mi kaptis tiun eblecon kaj decidis viziti tiun monaĥejon. En tiu loko vivis tiam s-ro David MacGill, fama budhana esperantisto, kies filo Stefan MacGill estis direktoro de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo, kiu poste elektiĝis ankaŭ vicprezidanto de UEA. Kaj David MacGill kaj la monaĥoj estis tre amikemaj, ili enkondukis min al la doktrino de tiu monaĥejo.

Laŭ ilia koncepto homoj apartenantaj al diversaj religioj devas esti toleremaj, kaj ili devas kompreni, ke la moralaj instruoj de la plej gravaj mondreligioj (interalie: kristanaj, islamaj, kaj budhanaj) estas esence la samaj. Sekve de tio, ne gravas, ĉu homo partoprenas religian ceremonion en iu templo aŭ en iu alia, gravas nur, ke li vivu laŭ la ĝeneralaj moralaj ordonoj. En tiu monaĥejo estis statuo de Budho kaj Jesuo, kiuj sidis unu apud la alia, kaj en tiu templo la monaĥoj festis la naskiĝtagon de ambaŭ Budho kaj Jesuo.

Dum mia restado en la Kyoto-Monaĥejo mi havis ankaŭ eblecon vojaĝi al la proksima urbo Kameoka, kie estis la centro de fama japana ŝintoisma religio nomata Oomoto. Tie s-ro Agou Takashi, ĝenerala sekretario de Esperanto-Populariga Asocio de la organizaĵo kondukis min en la doktrinon de tiu religio. Oomotanoj pretendas  - iom simile kiel la monaĥoj en la Kyoto-Monaĥejo (japane Kyoto Syudoin) - ke estas nur unu Dio, kaj homoj, apartenantaj al diversaj religioj kaj parolante diversajn lingvojn, adoras la saman Dion. Malgraŭ la fakto, ke la uzataj lingvoj kaj la religiaj ceremonioj estas malsimilaj. Sekve de tio. laŭ tiu koncepto ĉiuj homoj estas gefiloj de la sama unusola Dio, kaj en tiu senco ĉiuj homoj estas gefratoj. Kaj ĉiuj homoj estas civitanoj de la sama unusola Mondo, kaj estus avantaĝe, ke ĉiuj homoj povus paroli komunan pontolingvon por ebligi pli efikan interhoman komunikadon. La esenco de tiu instruo estas skribata sur

ŝtonego, nomata „*Monumento de Esperanto*” en la parko de la ĉefsidejo de Oomoto jene: „*UNU DIO, UNU MONDO, UNU INTERLINGVO*”.

Oomoto transformas la politeisman ŝintoan religion en specialan monoteisman religion. Tamen tio ne estas precize la sama monoteismo, kia estas ekzemple judismo, kristanismo aŭ islamo. Religio-akademiuloj ofte priskribas la Bibliajn religiojn kiel "*ekskluzivan monoteismon*". Tio signifas, ke la membroj de tiuj religioj kredas, ke ekzistas nur unu Dio kaj ĉiuj aliaj estas malveraj. Akademiuloj priskribas aliajn monoteismajn religiojn, inter ili ankaŭ Oomoton, kiel "*inkluzivan monoteismon*". Tio signifas, ke la membroj de tiuj religioj kredas, ke multaj dioj povas ekzisti, sed ĉiuj estas esence la samaj kaj venas de unu fonto; tial ne gravas, sub kiu nomo aŭ rito Dio estas adorata. Oomoto instruas, ke ĉiuj dioj, religioj, profetoj kaj mesaĝistoj tra la tempo venis de la sama fonto - la Supera Dio de la Universo[10]. Tiel kompreneblas. ke la nomo de Oomoto estas du ĉinaj ideogramoj 大本, kies signifoj estas "Granda Origino" aŭ "Grand Fonto" (de la Universo).

En la jaro 1982 oni organizis la Japanan Esperanto-Kongreson en la religia centro de Oomoto en urbo Kameoka. Tiam mi estis studento en la Nanzan Universitato en Nagoya kaj la organizan-toj bonkore invitis min prelegi dum la kongreso kaj gastigis min

10 https://oomoto.or.jp/English/enFaq/indexfaq.html

senpage. Poste mi informiĝis, ke fondiĝis Universala Homama Asocio ene de Oomoto kaj tiu organizaĵo morale kaj finance helpas malriĉulojn en diversaj Sud-Aziaj landoj. Pro tio post mia pensiuliĝo ankaŭ mi membriĝis en tiu organizaĵo kaj kiel maljunulo nun mi povas konkludi, ke mia membreco en tiu organizaĵo kaj miaj ĉeestoj en diversaj eventoj de Oomoto certe helpis min pli bone kompreni la Mondon en kiu ni vivas, kaj tio certe riĉigis mian vivon.




Grupo de ŭonbulanoj apud la Monumento de Esperanto en la ĝardeno de Oomoto en urbo Kameoka

# LA RELIGIO DE BONFAROJ

En la jaro 1983 mi studis en Japanio kaj tiam mi ĉeestis sociosciencan konferencon en Yokohama kun Lee Jungkee, kiu tiam estis la ĝenerala sekretario de Korea Esperanto-Asocio. Ambaŭ mi kaj li prelegis en la konferenco en la sama senco kaj poste li invitis min viziti Sud-Koreion. Sed dum tiu tempo Hungario (same kiel ĉiuj orienteŭropaj landoj) apartenis al la komunisma mondo sub kontrolo de Sovet-Unio kaj pro tio orienteŭropano tute ne povis vojaĝi al Seulo tiam. Sed mi interesiĝis pri la korea kulturo kaj kiam mi prelegis en alia socioscienca konferenco en Pekino, la ĉina ĉefurbo dum 1986, tiam mi vojaĝis al Pekino tra Pyongyang, la nord-korea ĉefurbo.

Poste okazis politikaj ŝanĝoj en Eŭropo dum 1990, kaj tiam Hungario (por la unua fojo en Orienta Eŭropo) konstruis diplomatiajn rilatojn kun Sud-Koreio. Post tio estiĝis ebleco por mi viziti ankaŭ la sudan parton de la Korea duoninsulo. Post mia pensiuliĝo mi havis pli da libertempo por vojaĝadi tra la mondo kaj tiel mi ĉeestis interesan unikan eventon, nome la „7-an Internacian Esperanto-Renkontiĝon de Meditado” en la sankta tereno de Ŭonbulismo en urbo Iksan de la 8-a ĝis la 12-a de januaro 2012[11]

11 https://www.oomoto.or.jp/Esperanto/gazeto/Oomoto2012/uxonbulismo.html

Tiam mi spertis allogan bonan etoson, aŭskultis saĝajn pensojn dum interesaj prelegoj, ĝuis bongustajn manĝaĵojn, ĉeestis interesajn ekskursojn kaj renkontis amikajn homojn, kiuj videble respektis kaj amis unu la alian. Pro tio mi decidis ĉiu-jare ĉeesti tiujn renkontiĝojn, kio estiĝis parto de mia socia vivo, kaj la ĉeestado donis al mi pozitivajn energiojn por feliĉe vivi en harmonio kun la naturo dum la venonta jaro.

La nomo ŭonbulismo (원불교 koree, prononce ŭonbulgjo, 圓佛教 ĉine, kaj Won-Buddhism angle)  estas kunmetitaj vortoj por vero, iluminiĝo kaj instruado. „Ŭon" signifas „cirklo" kaj simbolas la Finfinan Absolutan Universalan Veron (Ultimate Absolut Universal Truth en angla lingvo). „Bul" signifas „iluminiĝo", kaj „Gyo" signifas „instrui la veron". Tial ŭonbulismo estas la religio, kiu kondukas nin al iluminiĝo pri la vero. En tiu religio oni ne kredas je personigita Dio, sed la kredobjekto estas la Unu Cirklo, la simbolo de la Finfina Absoluta Universala Vero.[12]

Ŭonbulismo igas la instruon de Budho trafa kaj taŭga por la nuntempa socio dum la dudeka kaj nia dudek unua jarcentoj. Ĝi celas revigligi kaj modernigi budhismon, alporti la antikvan budhisman veron al nia nuntempa socio kaj uzi budhanajn instruojn kaj meditadon por praktikaj kaj utilaj celoj. Dum la meditada renkontiĝo mi spertis, ke la ceremonio de 108 riverencoj

12 https://www.sotaesancenter.org/whats-wonbuddhism

estis ege taŭga por komprenigi la situacion de la mondo, en kiu ni vivas, kaj resumis la moralajn devojn, kiujn ni devas plenumi dum nia vivo.

La celo de ĉi tiu religio estas konstrui Unu Mondan Komunumon kaj realigi la unuecon de vivo bazita sur la budhana mondkoncepto de interdependeco kaj interligiteco de ĉiuj. Tiu koncepto estas tre grava en la budhana doktrino, la interdependeco de ĉiuj agadoj, eventoj kaj okazaĵoj en la Universo estis la fundamenta instruo ankaŭ en la Silsangsa templo, en kies universitato nomata Indramang Daehak kaj altlernejo nomata Silsangsa Chakeun Hagkyo mi instruis eŭropajn lingvojn dum unu jaro.

Ĉi tiu religio estis fondita de Granda Darma Majstro Sotesano (angle Sotaesan, origina nomo Bak Jungbin, 1891–1943) en Koreio en 1916 kun la fonda slogano: "*Jam progresas materio, ni disvolvu la spiriton.*" Nuntempe, en la dudekunua jarcento ni vidas, ke tiu slogano estas pli aktuala, ol estis en 1916, kiam Sotesano fondis tiun novan religian movadon. Nun la homaro jam kapablas sendi vojaĝantojn al la Luno, tamen oni ne povas savi la vivon de milionoj da mizeruloj, kiuj mortas pro manko de manĝo kaj trinkebla akvo en multaj landoj de la mondo. La homaro jam produktis tiom multe da nukleaj armiloj, ke per ili oni povus mortigi miliardojn da homoj kaj povus detrui la vivkondiĉojn sur la Terglobo.



La pagodo de Sotesano en la ŭonbulana religia centro

Materialismo estas fakto, kiun ni ne povas eviti. Tamen, ĉar la nuntempa socio fariĝas ĉiam pli materialisma, teknologie progresinta kaj tutmonde integra, estas grave disvolvi nian spiritecon almenaŭ en egala mezuro. Se la homaro komprenus tiun bezonon, tiam la mondo estus pli paca kaj eble ne okazus kruelaj militoj kun centmiloj da viktimoj, kiujn ni hungaroj spertis kaj spertas ankaŭ en niaj najbaraj landoj.

Estas grava punkto, ke ŭonbulismo same kiel multaj aliaj orient-aziaj religioj (ekzemple Oomoto) ne pretendas, ke nur tiu religio estas la sola vera religio, sed la membroj de tiu religio estas malfermaj kaj emas akcepti ankaŭ aliajn kredojn kaj ili klopodas kunlabori kun membroj de aliaj religioj por konstrui pli bonan mondon.

Ĉar kaj la doktrino de tiu religio kaj la bona etoso de la renkontiĝoj de tiu komunumo estis allogaj por mi, pro tio mi ĉeestis ĉiujn internaciajn renkontiĝojn de meditado dum la lastaj pli ol dek jaroj, krom la tempo de la kronvirusa epidemio. Tio estis parto de mia socia vivo. Kaj estis honoro kaj ĝojo por mi, ke multaj koreaj ŭonbulanoj vizitis min en Budapeŝto dum la lastaj jaroj, ni fariĝis geamikoj. Pro tio estis granda honoro por mi ke dum la 17-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado en 2023 (la 108-a ŭonbulana jaro) Ĝonsano, la nuna ekleziestro, ĉefmajstro de ŭonbulismo oficiale akceptis min

membro de tiu komunumo kaj donis al mi la 圓大圓 (koree: 원대원, prononce: Ŭon Deŭon) nomon.

La fundamenta doktrino de ŭonbulismo estas la Kvar Bonfaroj (angle: Fourfold Grace, hungare: Négy Kegyelem, vagy Négy Jótétemény) kaj la tri studoj. La Kvar Bonfaroj estas ĉiela-tera bonfaro, gepatra bonfaro, kunvivula bonfaro kaj leĝa bonfaro; la tri studoj estas spirita kultivo, afera-principa esploro kaj justaga elekto.

Ŭonbulanoj esprimas dankemon al ĉi-tiuj Kvar Bonfaroj (alivorte: Kvarobla Graco). Sen tiuj oni ne povas vivi. En ŭonbulismo tio ne estas nur simpla teorio, pri kio oni filozofas, sed ankaŭ praktiko, tre grava parto de la vivo de ŭonbulanoj. Eĉ laike estas facile komprenebla ties logiko, nome, ke ĉiu homo ŝuldas sian vivon al siaj gepatroj, oni ne povas vivi sen la Terglobo kaj sen sunradioj, oni devas vivi kun aliaj kunvivuloj sur la Terglobo, kaj ke oni nur povas kaj devas vivi en harmonio kun la ĝeneralaj leĝoj de la Universo.

# TAGMANĜO KUN LA REĜO

Kiam mi partoprenis manaĝer-edukan kurson en la usona urbo Boston, tiam mi legis la venontajn vortojn sur aŭtobuso: "*The one who dyes with the most toys wins*". (*Tiu homo venkas, kiu kolektas la plej multnombrajn aĵojn dum sia vivo.*) Mi ne bone komprenis la signifon de tiu frazo, sed miaj usonaj kolegoj klarigis al mi, ke temas pri mondfilozofio. Tiu citaĵo estas slogano de egoismaj homoj, kies celo estas kolekti ĉion, kion eblas. Ili sentas feliĉon, se ili sukcesas ricevi pli multajn dolarojn, pli komfortan loĝejon, pli bonkvalitan aŭtomobilon, ktp. Kaj ofte okazas, ke al ili ne gravas, ĉu ili akiras tiujn aĵojn konforme al moralaj leĝoj aŭ kontraŭ leĝoj.

Mi renkontis multajn homojn dum mia longa vivo, kiuj estis nekredeble riĉaj. Eble kelkaj el ili sentis feliĉon pro tiu riĉeco, sed laŭ miaj spertoj la plejmulto estis malfeliĉaj. Ĉar ili ne ĝojis pro sia riĉeco, sed ili sopiris akiri pli da mono kaj pli da valoraĵoj kaj pli da potenco.

Kiam mi estis juna infano, tiam mi legis fabelon kun la titolo "*Fabeloj de 1001 noktoj*". Legante la fabelojn, mi miris, kiel riĉaj la reĝoj kaj sultanoj estis en malproksimaj landoj, kaj mi enviis, ke ili havis nekredeble riĉajn kaj bongustajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Post multaj jaroj dum mia profesia kariero mi kune tagmaĝis aŭ vespermanĝis kun kvin reĝoj kaj

ŝtatprezidentoj. Unu el ili estis ege riĉa, kaj antaŭ la komuna tagmanĝo mi prepariĝis por havi eksterordinare bongustajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kiujn mi esperis havi en bona etoso, eble aŭskultante bonan muzikon kaj babilade kun amikaj homoj. Sed ne tiel okazis. La reĝo alvenis en la ĉambron, ĉirkaŭite de seriozaj korpogardistoj, kiuj havis timigajn armilojn. Krome la reĝo ŝajnis esti senapetiteca. Do li rapide finis la manĝadon kaj tiam la kelneroj tuj forportis ĉiujn manĝilojn kaj manĝaĵojn el la tablo kaj tiel mi finis la manĝon preskaŭ malsate.

Aliflanke, kiam mi estis en Centra Afriko proksime al la Viktoria lago kaj al la Ekvatoro, tiam mi trovis multajn malriĉajn vilaĝojn, kie eĉ elektra kurento ne estis. Kaj tie mi renkontis multajn malriĉajn homojn, kiuj malgraŭ malriĉeco ŝajnis esti feliĉaj. Ili estis optimistaj kaj havis grandajn familiojn kun multaj infanoj. Male en multaj riĉaj landoj de Eŭropo kaj Orienta Azio mi trovis multe da pesimistaj homoj, kiuj pro pesimismo eĉ infanon ne emis naski.

Dum miaj mondvojaĝoj mi spertis, ke la mondkonceptoj kaj pensmanieroj de diversaj homoj estas multkoloraj. En la Okcidenta mondo la vorto „anarkio” havas negativan signifon. Sed kiam mi konatiĝis kun Ahn Jong Su (안종수, konata kiel Kara An en Esperantujo), la redaktoro de la revuo „*Solidareco*”, tiam mi komprenis, ke multaj homoj apartenantaj al tiu movado vere volas plibonigi la mondon. Ili opinias, ke homoj ne devas danci, kiel aliuloj ordonas.

En Hispanio mi partoprenis kongreson de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) kaj komprenis, ke ankaŭ tiuj homoj agadas por plibonigi la mondon per konstruo de solidareca maldekstrema socia sistemo, kie ĉiuj homoj (kaj riĉuloj kaj malriĉuloj) havas egalajn rajtojn. Aliflanke mi persone spertis dum la komunisma epoko en Orienta Eŭropo, ke la veraj komunistaj politikaj sistemoj estiĝis diktaturecaj, kaj mi legis, ke pro tio 96 milionoj da homoj mortis.

Tiam la agadoj de demokratiaj politikaj partioj kaj religiaj organizaĵoj estis malpermesataj. Ekzemple en Hungario studentoj ofte devis kaŝi sian kredon, por ke ili estu akceptitaj en universitatoj, kaj tiam oni maldungis multajn religiemajn homojn. Mi memoras, ke pro tio kelkaj oficistoj de mia urba oficejo ĉiudimanĉe devis vojaĝi al najbara urbo por partopreni religian ceremonion en tiu templo. Partopreno de ŝtataj kaj urbaj oficistoj, komunistaj partianoj, militistoj, policistoj, instruistoj, ktp. en religiaj ceremonioj en sia urbo en sia templo estis riska, ke pro tio oni maldungus ilin kaj ili perdus sian postenon.

Sed ne nur la ateismaj politikaj sistemoj estis maltoleremaj, sed ankaŭ multaj religiaj grupoj. Pro tio okazis religiaj militoj, en kiuj milionoj da homoj mortis dum la homara historio. Malgraŭ la fakto, ke en multaj kazoj tiuj religioj deklaris, ke ilia celo estas konstrui amikajn pacajn interhomajn rilatojn.

# VOJOJ AL LA PINTO DE LA FUĴI-MONTO

Dum mia profesia kariero kiel strategia manaĝero en la plej granda hungara industria entrepreno kaj unu el la estroj de la hungara parlamenta supera aŭditora kaj kontrola organizaĵo mi povis vojaĝadi en multaj landoj. Poste kiel komitatano de Hungario en Universala Esperanto-Asocio kaj prezidanto de Eŭrazia Kultura Centro mi povis viziti eĉ pli multajn landojn de ĉiuj kvin kontinentoj, kaj danke al la komuna internacia lingvo Esperanto mi facile povis komunikiĝi kun diversaj homoj.

Pri miaj spertoj oni eldonis libroserion kun la titolo "*Esperantlingve ĉirkaŭ la mondo*". La libroserio ĝis nun havas pli ol dek librojn, kaj ili estas ĉefe vojaĝraportoj. Sed dum miaj vojaĝoj mi havis la eblecon konatiĝi ankaŭ kun la pensmanieroj, mondkonceptoj kaj religioj de diversaj homoj vivantaj en diversaj kontinentoj. Estas konate, ke abundas religioj kaj mondkonceptoj, do indas esplori, kiu religio povas esti la vera religio kaj kia estas Dio, se estas Dio.

Laŭ mia kompreno kaj materiismo kaj teismo de diversaj religioj estas logikaj kaj veraj mondkonceptoj, ĉar iliaj fundamentoj estas similaj. Do en tiu senco estas logika konkludo, ke Dio estas, sed gravas, ke homa cerbo tute ne kapablas percepti la konkretan formon kaj estaĵan esencon de Dio. Same kiel blinduloj en la unua ĉapitro de ĉi tiu libro ne

kapablis  percepti la konkretan formon kaj estaĵan esencon de elefanto. Sed gravas, ke malgraŭ tio ili ĉiuj havis realan kaj veran percepton pri elefanto. Do pravis la blindulo, kiu diris, ke elefanto similis dikan serpenton; pravis tiu, kiu anoncis, ke la elefanto similis ventumilon; pravis tiu, kiu diris, ke la elefanto estis kolono ki el arbotrunko; pravis ankaŭ la aliuloj, kiuj diris, ke la elefanto similis muron, ŝnuron kaj lancon. Ĉiuj  pravis, ĉar partoj de la elefanto vere aspektis tiaj, kvankam ni scias, ke la konkreta formo kaj estaĵa esenco de la elefanto estas malsama, fakte pli ampleksa.

Por percepti tion ni komprenu, ke estas diversaj inteligentaj niveloj. Ekzemple elektrono povas fari kontakton kun protono kaj neŭtrono kaj kapablas krei atomon. Simile, atomoj povas krei molekulojn kaj molekuloj povas krei vivantajn ĉelojn. Ĉeloj povas krei organojn, ekzemple korojn, pulmojn, ktp. Organoj povas konstrui vivulojn, ekzemple katojn, hundojn kaj homojn. Homoj povas komreni, ke ili vivas sur la Terglobo, kaj ke la Terglobo moviĝas ĉirkaŭ la Suno, kaj la Suno estas parto de Galaksio, kaj galaksioj estas partoj de la universo.  Sed molekuloj tute ne kapablas kompreni, ke ili estas partoj de ĉenoj, kaj ĉenoj, ekzemple sangoĉenoj ne kapablas kompreni kio estas iliaj tasko kaj funkcio en la homa korpo, nome kunporti oksigenon el la pulmo al la koro. Simile, homoj ne povas kompreni estaĵojn sub elektronoj kaj protonoj, kaj ne

kapablas kompreni, kies parto estas la universo, kaj kio estis antaŭ la estiĝo de la universo.

Immanuel Kant, fama germana filozofo identigas la apriorajn formojn de percepto, ili estas spaco kaj tempo. Laŭ tiu koncepto homa menso povas percepti ĉiun okazaĵon nur en ĉi tiuj kvar dimensioj. La kialo estas, ke okazaĵo tute ne povas esti travivita, krom se ĝi estas rekonita, kie ĝi estis en spaco kaj kiam okazis en tempo. Sed la fakto, ke homa cerbo povas percepti okazaĵojn nur en kvar dimensioj, tute ne signifas, ke la mondo devas havi nur kvar dimensiojn.

Laŭ la plejmulto de religioj Dio estas pli ampleksa kaj kompleksa estaĵo, ol kion homa cerbo povas percepti, do la estaĵformo de Dio ne vortumeblas per homaj vortoj. Sed gravaj karakterizaĵoj ja vortumeblas, kaj pro tio oni nomas Dion Eternulo, Kreinto, Plenpotenculo, Granda Origino, Fonto de Ĉiuj Estaĵoj, ktp. en diversaj religioj.

Kelkaj religioj (ekzemple ŝintoo) kredas je multaj dioj, tiuj nomiĝas politeismaj religioj. Monoteismaj religioj (ekzemple kristanismo, islamo, ktp) kredas nur je la ununura Dio. Aliaj religioj (ekzemple kelkaj branĉoj de budhismo kaj ŭonbulismo) tute ne kredas je dioj. Tio ŝajnas esti grava diferenco, ĉu ne? Jes, ŝajnas esti diferenco, sed el iu vidpunkto tute ne estas diferenco. Laŭ la doktrino de Oomoto multaj dioj (japane: kami) ekzistas,

sed ili ĉiuj venas de la sama Supera Dio de la Universo, do efektive ekzistas nur unu Dio. Kiam oomotanoj preĝas al aparta kami laŭ nomo, ili komprenas, ke tio estas nur unu manifestiĝo de la ununura Dio. Kaj laŭ tiu logiko eĉ inter ateismaj religioj (ekzemple ŭonbulismo) kaj monoteismaj religioj ne estas esencaj diferencoj. Por mi Agou Takashi, la ĝenerala sekretario de Esperanto-Populariga Asocio de Oomoto klarigis tion frape, kiam li diris jene: "*... ŭonbulanoj ne kredas je Dio, sed ilia kredobjekto estas la Unu Cirklo, kiu estas la simbolo de la Finfina Absoluta Universala Vero. Precize estas tio, kiun ni nomas Dio.*"

Kio do estas la vera religio, kies instruojn homoj devus sekvi? Laŭ la supra logiko ĉiuj religioj, kiuj havas noblajn moralajn instruojn, estas sekvindaj.  Ekzistas multegaj religioj sur la Tero kaj multaj el ili asertas esti la vera religio, kaj asertas, ke tiuj homoj, kiuj ne apartenas al tiu religio, iros al la infero. Malgraŭ tio mi pensas, ke homoj povas atingi sian celon laŭ pluraj manieroj. Kaj ne gravas, kiel oni difinas sian celon, ĉu eniri Ĉielon, Nirvanon, Paradizon, aŭ simple havi kontentan maljunecon, kiam oni povas retrorigardi sian vivon kaj konkludi, ke sia vivo estis sukcesa. Kiel la japana proverbo diras: "*Estas multaj manieroj atingi la pinton de la Fuĵi-monto. Sed la Fuĵi-monto havas nur unu pinton.*"

La plejmulto de religioj instruas, ke Dio estas bona, helpema, pardonema, kompatema kaj tute ne kruela. Laŭ tiu koncepto senlogike estas diri, ke nur unusola religio povas esti vera, kaj Dio punos ĉiujn homojn, kiuj apartenas al aliaj religioj. Sekve de tio, mi akceptas nek religiajn, nek ideologiajn maltoleremojn. Dum mia vivo mi vivis en diversaj kulturoj, kie mi renkontis tri religiojn, kiuj havas valorajn moralajn instruojn. Tio estas kristanismo, Oomoto kaj ŭonbulismo. Konatiĝi kun ili kaj amikiĝi kun multaj membroj de tiuj komunumoj certe kolorigis, feliĉigis kaj riĉigis mian vivon. Mi opinias, ke laŭ la instruoj de tiuj religioj (kaj ankaŭ multaj similaj aliaj, pri kiuj mi ne povis informiĝi persone) oni povus konstrui pli bonan, solidaran, amikan kaj harmonian mondon.

Sed mi ne estas optimisma, ke tio realiĝos en la proksima estonteco. Ĉar mi konsentas kun la koncepto de la Nobel-premiita profesoro Christian de Duve, kiu malkovris, ke agresemo, egoismo, sopiro por potenco kaj similaj negativaj homaj trajtoj genetike koditaj en homa naturo kaŭzis preskaŭ permanentan bataladon inter diversaj popoloj dum la tuta homara historio. Tiel, historiaj spertoj avertas nin ne esti tro optimismaj.

# DESIDERATA

Go placidly amid the noise and the haste, and remember what peace there may be in silence. As far as possible, without surrender, be on good terms with all persons.

Speak your truth quietly and clearly; and listen to others, even to the dull and the ignorant; they too have their story.

Avoid loud and aggressive persons; they are vexatious to the spirit. If you compare yourself with others, you may become vain or bitter, for always there will be greater and lesser persons than yourself.

Enjoy your achievements as well as your plans. Keep interested in your own career, however humble; it is a real possession in the changing fortunes of time.

Exercise caution in your business affairs, for the world is full of trickery. But let this not blind you to what virtue there is; many persons strive for high ideals, and everywhere life is full of heroism.

Be yourself. Especially do not feign affection. Neither be cynical about love; for in the face of all aridity and disenchantment, it is as perennial as the grass.

Take kindly the counsel of the years, gracefully surrendering the things of youth.

Nurture strength of spirit to shield you in sudden misfortune. But do not distress yourself with dark imaginings. Many fears are born of fatigue and loneliness.

Beyond a wholesome discipline, be gentle with yourself. You are a child of the universe no less than the trees and the stars; you have a right to be here.

And whether or not it is clear to you, no doubt the universe is unfolding as it should. Therefore be at peace with God, whatever you conceive Him to be. And whatever your labors and aspirations, in the noisy confusion of life, keep peace in your soul. With all its sham, drudgery and broken dreams, it is still a beautiful world. Be cheerful. Strive to be happy.

by Max Ehrmann 1927

# *LA DESIDERATA*

*Iru trankvile meze de la bruo kaj hasto, kaj rememoru kian pacon oni povas trovi en silento. Kiel eble plej multe, sen kompromito, estu afabla kun ĉiuj homoj.*

*Parolu vian veron kviete kaj klare. Kaj aŭskultu aliajn, eĉ la mallertajn kaj malklerajn; ankaŭ ili havas sian rakonton.*

*Evitu laŭtajn kaj agresemajn homojn; ili malĝojigas la spiriton. Se vi komparas vin al aliaj, vi eble iĝos vanta, aŭ amara, ĉar ĉiam estos homoj pli grandaj kaj malpli malgrandaj ol vi.*

*Ĝuu viajn atingojn kaj viajn planojn. Restu ĉiam interesata pri via propra kariero, kiel ajn malaltranga; ĝi estas vera posedaĵo tra la onda fortuno de tempo.*

*Estu singarda en viaj komercaj aferoj, ĉar la mondo estas plena de trompado. Sed ĉi tio ne blindigu vin al tia virto, kiu ekzistas; multaj homoj strebas al altaj idealoj, kaj ĉie la vivo estas plena de heroeco.*

*Estu vi mem. Precipe, ne ŝajnigu amon. Nek estu cinika pri amo; fronte al ĉia manko de sentemo kaj disreviĝo, ĝi estas tiel persista kiel la herbo.*

*Akceptu afable la konsilon de la jaroj, gracie forlasante la aferojn de juneco.*

*Kultivu forton en via spirito por ŝirmi vin kontraŭ subita missorto. Sed ne ĝenu vin per malhelaj elpensaĵoj. Multaj timoj naskiĝas de laceco kaj soleco.*

*Preter salubra disciplino, estu milda kun vi mem. Vi estas infano de la universo ne malpli ol la arboj kaj la steloj; Vi rajtas esti ĉi tie.*

*Ĉu estas klare al vi, aŭ ne, la universo disvolviĝas laŭplane. Tial estu en paco kun Dio, kia ajn estas via koncepto de Li.*

*Kaj kiaj ajn viaj laboroj kaj aspiroj, en la malkvieta konfuzo de la vivo, konservu la pacon en via animo. Kun ĉiuj siaj kapricoj, penoj kaj rompit-aj sonĝoj, ĝi ankoraŭ estas bela mondo. Estu honesta. Strebu esti feliĉa.*

*Max Ehrmann 1927*

# ENHAVO

Monda statistiko pri religioj kaj aliaj mondkonceptoj …….….… 9

Kia estas elefanto? …………………………….……………….. 11

Kia estas Dio? ………………………...……………….. 12

Kiu estas Dio? ……………………………….……………… 15

Kiu kreis simiojn, se ne estas Dio? ……………..………….. 17

De animala ekzisto ĝis diiĝo ……………………..…………….. 18

La religio de amo …………………………………………… 22

Oomoto kaj la Kyoto-monaĥejo ……………………………… 25

La religio de Bonfaroj ………………………………...…… 29

Tagmanĝo kun la reĝo ……………………………...….. 35

Vojoj al la pinto de la Fuĵi-monto ………………….……….. 38

La Desiderata ……………………………….…………. 43

La ĝis nun aperintaj verkoj de la Aŭtoro …………………… 48

La verkoj de la Aŭtoro en la interreto ……………..………… 49

Titolpaĝo: La Monumento de Esperanto en la Oomoto parko

Kovrilpaĝo – Salutvortoj al la legantoj de D-ro MOLNÁR Lajos, prezidanto de Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo (angle: Budapest Medical Esperanto Expert Group) kaj vicprezidanto de Eŭrazia Kultura Centro (angle: Eurasia Cultural Center)

# La ĝis nun aperintaj verkoj de la Aŭtoro en ĉi-tiu libroserio „Esperantlingve ĉirkaŭ la mondo”

Ruĝa Suno kaj Verda Stelo

赤い太陽と緑の星

Vörös Nap és Zöld Csillag

황해 너머

Trans la Flava Maro

Sudorientaziaj vojaĝoj

Délkelet-Ázsiai utazások

东南亚游记

Tavasz a Szentföldön

A kenguruk földjén

인드라망 대학 - 에스페란토 쿠르(1 부)

인드라망 대학 - 에스페란토 쿠르(2 부)

Buddha ölelő karjaiban

Koreio, la kongreslando

มหาวิทยาลัยศรีนครินทรวิโรฒ – หลักสูตรภาษาเอสเปรันโต

A Nanzantól a Namsanig

Európa válaszút előtt

A trópusok világa

Az északi fénytől a Dél keresztjéig

Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigos la mondon?

Vojoj al la pinto de la Fuĵi-monto

# LA VERKOJ DE LA AŬTORO TROVEBLAS EN LA MALSUPRAJ RETPAĜOJ

http://verkoj.com/verkistoj/markus-gabor/

https://www.esperantofre.com/mondo/mglibroj.htm

https://hu.wikipedia.org/wiki/M%C3%A1rkus_G
%C3%A1bor_(eszperantista)

http://verkoj.com/pdf/web/viewer.html?file=http://verkoj.com/
dn/Markus%20Gabor/%C4%88u%20Esperanto%20plibonigas
%20la%20mondon.pdf

https://blog.oik.oszk.hu/?s=M%C3%A1rkus+G%C3%A1bor

https://www.youtube.com/watch?v=jvafLoqdX_4

https://eo.wikipedia.org/wiki/G%C3%A1bor_M%C3%A1rkus

https://commons.wikimedia.org/wiki/File:Budapest,_M
%C3%A1rkus_G%C3%A1bor_Prof._dr._eszperantista.JPG

https://www.wikidata.org/wiki/Q19724199

https://commons.wikimedia.org/wiki/File:Budapest,_M
%C3%A1rkus_G
%C3%A1bor_Prof._dr._eszperantista_(cropped).JPG

https://www.youtube.com/watch?v=VxrFa-0y6O4&t=620s

https://www.youtube.com/watch?v=IAQUUBH6eCs&t=649s

https://www.youtube.com/watch?v=e5DVxiz6uIg&t=364s

https://www.youtube.com/watch?v=jvafLoqdX_4

https://www.pecsma.hu/hirzona/pecsi-irok-es-muveszek-
koszontik-tavaszt/

D-ro MÁRKUS Gábor, la aŭtoro de la eseo, diplomiĝis en hungara universitato dum la komunisma periodo. En tiu tempo, li studis ateismon kaj dialektikan materialismon, ĉar tiuj estis devigaj temoj en ĉiuj universitatoj en orienteŭropaj landoj. Li poste faris esploradon kiel parto de sia doktora programo en Nanzan Universitato, katolika universitato en Nagoja, Japanio. Post doktoriĝo, li instruis eŭropajn kulturon kaj lingvojn en Indramang Daehak, privata universitato fondita de 1200-jara korea budhisma templo. Li ankaŭ prelegis ofte ĉe Oomoto, ŝintoa organizo en Kameoka, Japanio, kaj ĉe multaj konferencoj en Jerusalemo/Israelo, same kiel en Aŭstralio kaj multaj aliaj landoj en Eŭropo, Ameriko, Afriko kaj Azio.

Ekde 2012, li estas regula parolanto ĉe la internacia meditada renkontiĝo de la ŭonbulana religio en Koreio, kaj en 2023 la Granda Darma Majstro de la organizo donis al li la nomon WON Daewon. Ekde 2022 li estas membro de la Revizia Komitato de IKUE (Internacia Katolika Esperanto-Asocio). Dum siaj vojaĝoj tra la mondo, li ekkonis la pensmanieron, mondkoncepton kaj religiajn tradiciojn de diversaj popoloj. En ĉi tiu eseo, li resumas siajn spertojn kaj provas respondi la demandon: kiu estas la vera religio? Indas legi.

Budapest, December 28, 2023

D-ro MOLNÁR Lajos
Prezidanto, BMEEG
Vicprezidanto, ECC

7 25272 73070 6

**ISBN 978-963-571-506-0**

Dr. MÁRKUS Gábor, the author of the essay, graduated from a Hungarian university during the communist period. At that time, he studied atheism and dialectical materialism, as these were compulsory subjects in all universities in Eastern European countries. He later conducted research as part of his doctoral program at Nanzan University, a Roman Catholic university in Nagoya, Japan. After earning his doctorate, he taught European culture and languages at Indramang Daehak, a private university founded by a 1,200-year-old Korean Buddhist temple. He has also lectured frequently at Oomoto, a Shinto organization in Kameoka, Japan, and at numerous conferences in Jerusalem/Israel, as well as in Australia and many other countries in Europe, America, Africa and Asia.

Since 2012, he has been a regular speaker at the international meditation meeting of the Won Buddhist religion in Korea, and in 2023 the Great Dharma Master of the organization gave him the name WON Daewon. Since 2022, he has been a member of the Audit Committee of the IKUE (International Catholic Esperanto Association). During his travels around the world, he got to know the way of thinking, world view, and religious traditions of different peoples. In this essay, he summarizes his experiences and tries to answer the question: which is the true religion? It is worth reading.

Budapest, December 28, 2023

Dr. MOLNÁR Lajos
President, BMEEG
Vice president, ECC

7 25272 73070 6

**ISBN 978-963-571-506-0**